ISSN: 0827-3154

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

2005/1-2

vintro 2005/2006

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the *Lumo*

# LUMO



Esperantistoj manifestacias surstrate en Montrealo! (pĝ 4)

*Lumon* eldonas dufoje en jaro KEA, P.O.Box 2159, Sidney (BC) Kanado V8L 3S6 < www.esperanto.ca/kea/ >

*Lumo* ('light') is published twice yearly by the Canadian Esperanto Association

*Lumo* ('lumière') est la revue semestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

## Enhavo de la numero

**Agado de la kanada Esperanto-movado**
Nova Estraro de Kanada Esperanto-Asocio ........ 3
Sukcesa konferenco pri klimat-ŝanĝiĝo en Montrealo (B.-A. Legault) ........ 6
Forumo pri monda demokratio en Montrealo (N. Fleury) ........ 7
Favora decido de la nov-skotia parlamento pri kaj en Esperanto ........ 8
MEKARO en Toronto (K. Price) ........ 9
Dekdua ARE en Novjorkio (G. Greatrex) ........ 10
**Mallongaj Z-tagaj raportoj el...**
Calgary ........ 11
Toronto ........ 12
Victoria ........ 12
**Niaj membroj**
Peter Tan : Eterna komencanto de la Monda Lingvo ........ 12
**Artikoloj**
Kelkaj notoj pri la 6a Tutamerika Kongreso de Esperanto (K. Price) ........ 14
Pledo por pli da Esperanta klereco (J.L. Besada) ........ 16
Internacia komunikado per 'Globalish' (B. Arthur) ........ 18
**Recenzoj**
Ĉiu - Ĉiun : sep jardekojn en la Esperanto-movado (B. Arthur) ........ 19
Eta perlo nord-amerika : Nanatasis (R. Moerbeek) ........ 20
**Internaciaj novaĵoj**
Prezidanto de UEA alparolis la UN-Komisionon pri Homaj Rajtoj ........ 20
*Vojaĝo en Esperanto-Lando* denove haveblas ........ 21
Vilna Deklaro ........ 22
Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2005 ........ 23
La estonteco de eŭropaj lingvoj estas minacata, diras fakuloj ........ 24

Eldonkvanto de ĉi tiu numero : 200
Redaktis : Paul Hopkins
Kunlaboris : Geoffrey Greatrex, Ken Price


Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj. Manke de indiko pri aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Ni invitas niajn legantojn sendi siajn taksojn, opiniojn, kaj kritikojn, kio ebligos plibonigon de la revuo. *Lumon* senpage ricevas la membroj de Kanada Esperanto-Asocio, kiel ankaŭ asocioj kun kiuj KEA havas interkonsenton pri interŝanĝo de revuoj.

**Se vi ankoraŭ ne realiĝis al KEA por 2006, bv. fari tion nun!**
Por (re)aliĝi al Kanada Esperanto-Asocio, sendu ĉekon por $20 al
Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159
Sidney (BC) V8L 3S6



## Nova Estraro

De la komenco de 2006, Kanada Esperanto-Asocio havas novan estraron. La estraro havas naŭ anojn, kiuj elektis inter si la ĉefestraron. La nova prezidanto de KEA estas **Wally du Temple** (BC), vicprezidanto restas **Normand Fleury** (QC), nova kasisto estas **J. Paul Lang** (BC), kaj sekretario restas **Ken Price** (ON). Aliaj estraranoj estas **Edmond (Kajmo) Brent** (QC), **Aaron Chapman** (BC), **Geoffrey Greatrex** (ON), **Allan Simon** (AB), kaj **Bob Williamson** (NS).




**Wally du Temple** (prezidanto) esperantistiĝis en 1969 en Otavo. Li edziĝis al samideanino **Olga Valentova** el Ĉeĥio en 1972. Iliaj gefiloj, **Evan** kaj **Hana**, estas denaskaj geesperantistoj. Spaco mankas por detale priskribi la tutan agadon de Wally du Temple kiel esperantisto. Li fondis la Esperanto-Klubon de Victoria (1970), estis redaktoro de *Lumo* dum du ofic-periodoj, prezidanto de KEA plur-foje, estro de la Libroservo kaj Informofako de KEA kiam ili troviĝis en Brita Kolumbio inter 1976 kaj 1984, komitatano de UEA, kasisto de KEA dum jardeko, organizanto de la Nord-Okcident-Regiona Esperanto-Konferenco (NOREK) dekkvinfoje, organizanto de kvar Kanadaj Kongresoj de Esperanto, kaj prezidanto de la Loka Kongresa Komitato de la 69a Universala Kongreso en Vankuvero. En 1999 la estraro elektis Wally Honora Membro de Kanada Esperanto-Asocio.




**Normand Fleury** (vicprezidanto) eklernis esperanton en 1979 en Angers, Francio. Dum la somero de 1980 li partoprenis la Internacian Junularan Kongreson en Rauma (Finnlando) kaj la Universalan Kongreson en Stokholmo (Svedio) kaj vere entuziasmiĝis pri la eblecoj de la esperanto-movado. Li uzadis la Pasportan Servon en dudeko da landoj kaj partoprenis amason da Esperanto-eventoj. En 1981 Normand edziĝis al **Zdravka Metz**, esperantistino el Kroatio, kaj en 1982, kiam ili (re)venis al Kanado, ili transprenis la estradon de la landa oficejo de KEA en Montrealo kaj de la Libro-Servo en 1984. Kun grupo da esperantistoj el Kebekio, Normand kaj Zdravka starigis la provincan asocion "Esperanto-Societo Kebekia", kiun Normand nun prezidas jam de pli ol dudek unu jaroj. Normand ankaŭ respondecis pri la organizado de la IJK de TEJO en Montrealo en 1992 kaj de la Nordamerika Kongreso de Esperanto en 1998, ankaŭ en Montrealo. Ekde 1993 li estas la ĉefa organizanto de la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE), tre sukcesa semajnfina renkontiĝo okazigita unue en Vermonto kaj nun en Nov-Jorkio. Normand ankaŭ starigis la Mez-Kanadan Renkontiĝon (MEKARO) kaj la Semajnfinon por Esperanto & Biciklado (SEBO). Li estas landa peranto de la Pasporta Servo, dumviva membro de UEA, kaj fak-delegito de UEA. Vere ne sufiĉas la spaco por indiki ĉion kion li faris por la movado en la lastaj 25 jaroj. Normand aktivas diversmaniere por la movado, ĉar li kredas ke danke al Esperanto ni povus havi pli bonan mondon. En 2005 la estraro elektis Normandon Honora Membro de Kanada Esperanto-Asocio.

**J. Paul Lang** (kasisto) loĝas en Victoria (BC) dum la plimulto de la pasintaj 17-jaroj, post lia aliĝo al la kanada mar-armeo kiel teknikisto pri radara kaj elektronika militado. Plenkreskinte

en la interno de Brita Kolumbio, li trovis bone reveni al sia naskiĝloko. Paul antaŭ nelonge eniris la submar-armeon, kaj ĝoje anticipas sian unuan plonĝon SUB la ondojn, post jaroj da velado sur ili.




**Ken Price** (sekretario) eklernis Esperanton en 1954 kiam li estis ankoraŭ en la lernejo, en Anglujo. Kiam li iris al universitato, en Bristol, Ken aliĝis al mezgrada kurso de la Bristola Esperanto-Societo, kaj poste fariĝis "help-sekretario" de la societo. En 1957 Ken transloĝiĝis al Toronto, en kies Esperanto-klubo li renkontis eŭropajn esperantistojn, kiuj ĵus enmigris. Ili ne povis bone paroli la anglan lingvon, do oni multe uzis Esperanton. Ken fariĝis sekretario de la Esperanto-Klubo de Toronto, kaj en 1958 li partoprenis la refondadon de la Kanada Esperanto-Asocio, kio okazis dank' al iniciato de torontano **Dez Hackett**; tio necesis ĉar la antaŭa KEA estis malaperinta dum la dua mondmilito. Dum la sekvaj dudek jaroj Ken havis diversajn postenojn en KEA: sekretario, kasisto, redaktoro de ***Lumo***, kaj "estro" (kaj sola laboranto!) de ĝia libroservo. Dum la okdekaj kaj naŭdekaj jaroj Ken pro profesiaj laboroj ne havis multan tempon por movadaj aktivecoj, sed de post kiam li emeritiĝis, li denove havas tempon regule ĉeesti lokajn klubkunvenojn (kvinfoje monate), partopreni regionajn renkontiĝojn en Brita Kolumbio kaj nord-orienta Usono, kaj redakti la revueton de la Esperanto-Rondo de Toronto, ***La Torontano***. Ken estas dumviva membro de KEA (kaj de UEA kaj ELNA).




**Edmond (Kajmo) Brent:** Esperanto venigis min al Kanado en 1957. Tiam mi eklaboris en la eldonejo-presejo Esperanto Press en Okvilo (Ontario) kiel tradukisto kaj reviziisto, precipe pri la esperantigo de usonaj infanlibroj. Franko el la germania Rejnlando, mi estis lerninta esperanton je la aĝo de 12 jaroj. De tiam ĝi estadas unu el miaj familiaj lingvoj: **Karina**, mia filino, estas efektive esperantlingvano triageneracia. Diplomiĝinte kiel kursgvidanto ĉe la Germana Esperanto-Instituto, ekde mia adoleskeco mi instruis esperanton private kaj publike al samaĝuloj kaj plenkreskuloj, unue en Germanio kaj poste en Kanado kaj Usono. Notindaj lokoj: Popola Altlernejo en Monaĥgladbaĥo (Germanio), YMCA en Toronto, Universitato Brock en Sankta Katarino (Ontario), Kalifornia Ŝtata Universitato en Sanfrancisko. Kiel socilingvisto kaj esperantologo mi instruis universitate miafakajn kursojn ankaŭ per esperanto en Lieĝo (Belgio) kaj en Sanfrancisko. Por esperantlingvaj sciencistoj kaj terminologoj, kadre de la Terminologia Esperanto-Centro (TEC) de UEA, mi organizis kaj realigis fakan seminarion en Poprad (Slovakio). Inter miaj socilingvikaj studoj pri esperanto la plej interesa estas sonregistra esploro pri la varieco de la parolata esperanto ĉe 18 diversoriginaj anoj de la toronta SAT-kongreso de 1973 (kongreso kiun mi kunorganizis). Efektive ankaŭ pri la movada organizado mi aktivis kaj aktivas, jam germanie, sed antaŭ ĉio internacie kaj kanade. Por KEA mi jam agis kiel redaktoro kaj vicprezidanto; sed mia ĉefa kontribuaĵo estis la kreado kaj plurjara funkciigado (notinde kun la helpo de Ken Price) de la lingva Ekzamenkomitato de KEA — grava asocia servo revivigenda prepare al pli vasta enkonduko de esperanto en la kanadajn lernejojn. Denove pri infanlibroj: mi




helpis la Esperanto-Societon Kebekian per la reviziado kaj editorado de la esperanta versio de *Nanatasis* de **Robert Dutil**, kiun ESK publikigis en 2005. En majo-junio samjare mi reprezentis UEA-n montreale (kun **Normand Fleury**) en la konferenco G05 pri tutmonda demokratio organizita de la Internacia Forumo de Montrealo: rekomendo pri esperanto aperis en la aktoj de tiu konferenco (post longa postkulisa laborado).




**Aaron (Arono) Chapman** (estrarano) estas diplomito pri lingvistiko kaj plurmedio, estrarano kaj dumviva membro de KEA. Li naskiĝis en Halifakso kaj nun loĝas kun sia edzino **Karlina** en Vankuvero. Ĉiam interesiĝante pri diversaj lingvoj kaj lingvaj fenomenoj, Arono esperantistiĝis en 1995 trovinte informojn pri nia lingvo en la interreto. Li ekregis la lingvon memstare kaj frue ekpartoprenis en diversaj retaj iniciatoj. Li estas unu el la originaj planistoj kaj efektivigintoj de la kursejo **Lernu** kaj li daŭre envolviĝas de tempo al tempo en alia laboro de E@I. Samtempe li registras kaj produktas la retradion kaj podkaston **Radio Verda**, pioniro de sendependa, internacia, interreta aŭdprogramaro en Esperanto.



**Geoffrey Greatrex** (estrarano) eklernis la lingvon en 1985 en sia lernejo en norda Anglio. Poste, konstatinte la utilecon de la lingvo, li regule ĉeestis la kunvenojn de la grupo en Oksfordo, kie li studis, kaj fondis studentan asocion. Geoffrey helpis revivigi JEB, la junularan sekcion de la Esperanto-Asocio de Britio, en 1988 kaj fariĝis ties prezidanto. Samtempe li aktivis en EAB kaj eĉ elektiĝis ĝia prezidanto en 1991 (ĝis 1993); li denove prezidis ĝin inter 1997 kaj 1998. En la 90aj jaroj Geoffrey sufiĉe ofte ĉeestis kongresojn, ne nur en Eŭropo sed ankaŭ tiun de TEJO en Montrealo en 1992. En la Eŭropa Esperanto-Unio li agis kiel sekretario de la komitato je la komenco (en 1992), poste prezidantiĝis en 1995. Krom tiom da prezidado, Geoffrey laboras kiel profesoro pri antikva historio, precipe romia kaj bizanca. Pro tiu laboro li iom vagis de loko al loko: post la studoj en Oksfordo, li enposteniĝis en Otavo kiel profesoro, sed post jaro devis reiri al Britio, kie li laboris en Kardifo dum du jaroj. En 1998 li revenis al Kanado, ricevinte postenon ĉe Universitato Dalhousie en Halifakso, kaj en 2001 li revenis al sia naskiĝurbo Otavo, kie li havas profesoran postenon ĝis nun. De 2000 ĝis 2003 Geoffrey lerte redaktis ĉi tiun revuon ***Lumo***, kaj dum la ofic-periodo 2004/2005 li servis kiel prezidanto de KEA, de kiu li ankaŭ estas dumviva membro.



**Allan Simon** (estrarano) naskiĝis en Aŭstrio kaj enmigris Kanadon kiel plenkreskulo. Jam de multaj jaroj li aktivas en la Esperanto-movado de Kalgario, kie li nun partoprenas organizan laboron por la Sepa Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE 7), sed li ankaŭ multe kontribuis al la laboro de la tut-kanada Esperanto-movado kiel kasisto de KEA kaj sekretario de la **Eduka Fondaĵo Carson**.



**Bob Williamson** (estrarano) eklernis Esperanton dum la fruaj okdekaj jaroj post kiam li aŭdis anonceton en radio pri senkosta perpoŝta kurso. Antaŭ ol li finis ĝin, sub la gvidado de **Kim Keeble**, Bob jam fariĝis grupano de la halifaksa diskut-rondeto sub la gvidado de **Harry Lewis**. Krom sia multjara servado en la estraro de KEA, Bob redaktas la ĉiumonatan gazeton de la halifaksa rondo ***Inter Ni*** dum la plejparto de ĝiaj 20 jaroj.

## Sukcesa konferenco pri klimat-ŝanĝiĝo en Montrealo

[Fine de novembro kaj komence de decembro (2005) okazis en Montrealo granda konferenco pri klimata ŝanĝiĝo. La konferencon partoprenis kiel delegitoj pluraj esperantistoj, kaj la esperantistoj de Montrealo vigle partoprenis surstratan manifestacion organizita okaze de la konferenco. Post enkonduka artikolo de **Boris-Antoine Legault**, kiu grave kontribuis al la sukceso de la esperantista partopreno en la manifestacio, sekvas raporto de **Normand Fleury**, kiu reprezentis (kun **Kajmo Brent**) KEA kaj UEA en la konferenco.]




De la 28a de novembro ĝis la 9a de decembro okazis en Montrealo (Kebekio, Kanado) pinta konferenco de UN pri klimat-ŝanĝiĝo. La aranĝo konsistis el du paralelaj partoj: samtempe okazis la 11-a konferenco (COP-11) de partoprenantoj en UNFCCC (kadra konvencio pri klimat-ŝanĝiĝo) kaj la unua renkontiĝo de partioj de la kjota protokolo (COP/MOP-1), kiu ekfunkciis la 16an de februaro 2005.

Kiel akreditita observanto reprezentanta internacian junularon la konferencon partoprenis almenaŭ unu (t.e. pri kiu ni konas) esperantisto - **Oleg Izjumenko** el Rusio. Laŭ opinio de la plej multaj partoprenantaj landoj, ekologiaj organizaĵoj kaj la sekretario de UN pri klimat-ŝanĝiĝo, la konferenco estis granda sukceso. Interalie, la kjota protokolo ekpraktikiĝis per akcepto de ĝiaj funkciigaj reguloj (la marakeŝaj akordoj), oni starigis diskutgrupon pri la "post 2012-a" periodo de la nova politika klimat-reĝimo (2013-2017) kaj ankaŭ paralelan dialogon, kiu enplektas kaj Usonon, la plej grandan ellasanton de forcejaj gasoj en la mondo, kaj la evoluantajn landojn. La tutmonda urbestraro eĉ akceptis la junularan deklaron, kiu postulas 30-



elcentan malpliigon (sub la nivelo de 1990) de forcejgasaj ellasoj ĝis 2020 kaj 80-elcentan malpliigon ĝis 2050.

La 3an de decembro okazis la unua tutmonda manifestacio por la klimato, en kiuj partoprenis 100 000 homoj en pli ol 30 landoj. En Montrealo, kie 40 000 homoj manifestaciis, kelkaj dekoj da esperantistoj portante grandan banderolon [vidu la bildon] alvokis ne nur la registrarojn sed ankaŭ ĉiujn unuopajn esperantistojn kaj esperantajn organizojn kunagi por urĝe bremsi klimatajn ŝanĝiĝojn. Porklimata esperanta agadgrupo estis tiam starigita (por aliĝi al ĝi oni sendu malplenan retmesaĝon al < 3dec2005-subscribe@elisto.org >).

— Boris-Antoine Legault

## Forumo pri monda demokratio en Montrealo

Mi plurfoje partoprenis Universalan Kongreson de Esperanto aŭ aliajn E-renkontiĝojn kaj foje fakajn konferencojn sed malofte havis la okazon ĉeesti, kiel delegito de KEA-UEA, internacian konferencon. Okazis fine de majo 2005 internacia konferenco pri monda demokratio. Ĉeestis ĝin kvarcent homoj reprezentaj plej variajn organizojn neregistarajn, sociajn, ktp. El la kvar-taga programo, nur unu sesio traktis la perdon de lingva diverseco en la mondo. Mi parolos pri tio pli poste. Mi diru unue ke estis interpretado en tri lingvoj (angla, franca, hispana) nur de la plej grandaj kunsidoj. La aliaj laborgrupoj, kunvenoj okazis preskaŭ nur en la angla. La lingva nivelo estis tre varia kaj foje estis tre pene por mi kompreni la novzelandan akcenton aŭ la niĝerian elparoladon de iu.

Dum la malferma sesio, mi aŭdis pri la respekto al diverseco de kulturoj, popoloj, lingvoj. Mi ankaŭ aŭdis tuj dekomence de iu fakulo usona : « Mi neniam scias kiun lingvon uzi dum internacia konferenco » ! La preleganto de EuroMed (Europa mediteranea organizo) el Tunizio pardonpetis pri lia uzo de la franca, kiu cetere ne estas lia denaska lingvo (tiel li diris), kaj poste la parolantino de Mercosur (SudAmerika komerca organizo) pardonpetis pri la uzo de la angla anstataŭ la hispana.

Do estis konstante lingvaj baroj, malfacilaĵoj. Rusino diris « spertuloj en lokaj aferoj ofte ne kapablas paroli fremdajn lingvojn kaj tiel neniam partoprenos en internaciajn konferencojn. » Sed mi revenu al la kunsido pri lingva diverseco. Dekomence oni starigis la demandojn: Kial ni parolas pri kultura diverseco ? Kio estas la plej granda dangero rilate la kulturan diversecon ? Certe la okcidenta komerca kulturo estas videbla pli kaj pli ĉie, sed ĉu la homoj estas devigataj aĉeti ĝin aŭ libere faras tion ? Ĉu kulturo estas nur varo ? Dum tiu kunsido estis prelegoj pri la neceso konservi la lingvan diversecon de la mondo; ke perdo de lingvo estas perdo de kulturo; ke ministroj pri kulturoj protektas sian nacian kulturan merkaton ne la kulturan diversecon aŭ minoritatojn de sia lando. Ĉu monprofita kulturo lasas lokon al loka popola kulturo ?


Je la lasta parto de la kunsido eblis prezenti proponojn prezentota en la fina kunsido. Mi do proponis ke ili konsideru la uzon de neŭtrala internacia lingvo kiel solvo. Tuj du prelegantoj rebatis al mi ke Esperanto estas tro eŭropa lingvo por esti akceptata en la tuta mondo kaj ke la angla venkis kiel internacia lingvo. En mia propono mi ne menciis Esperanton! Ili ja sciis ke mi estas la delegito de la Esperanto-movado sed ne volis konsideri mian proponon. Mi vere miris ke forumo pri demokratio ne konsideras ke uzo de neŭtrala lingvo povus helpi al pli bona komunikado en la mondo. Mi povus esti tute malgaja pri la afero sed mi konsideras ke mi almenaŭ sukcesis prezenti ke Esperanto estas alternativo.

Ĵurnalisto interesiĝis pri tio kaj mi havis „koridorajn konversaciojn” kun homoj kiuj volis aŭdi pli pri Esperanto. Estis ebleco lasi informilojn ĉe tabloj en la kongresejo, kaj homoj forprenis plurajn dekojn da ili. Inter tiuj informiloj ni disdonis la manifeston de Prago en la franca kaj la angla.

Mi konscias ke mia partopreno ne alportis grandan sukceson, sed almenaŭ pluraj homoj (eble cento) eksciis pri Esperanto. Cetere, mi ja plene ĝuos mian venontan E-kongreson pensante ke mi profitas de la avantaĝoj de Esperanto, dum la cetera mondo daŭre frontas lingvajn barojn dum ili internacie kunvenas. Ni esperu ke ili iam „vekiĝos”.

— Normand Fleury

## Favora decido de la nov-skotia parlamento pri kaj en Esperanto



Graham Steele, nov-skotia parlamentano kaj esperantisto

Dank' al la klopodoj de **Graham Steele**, esperantisto kaj ano de la Nov-Skotia parlamento, rezolucio gratule rekonanta la laboron de la nov-skotia esperantistaro estis prezentita al nov-skotia parlamento la kvinan de majo (2005) kaj akceptita. Ĉi tiu rezolucio eble ne estas la unua rezolucio favora al Esperanto prezentita al kanada parlamento (aŭ eble jes?), sed la aperigo de ĝia teksto **en Esperanto** en la oficialaj parlamentaj tekstoj, trovebla en la tuttera teksaĵo ("la Reto") ĉe <http://www.gov.ns.ca/legislature/hansard/han59-1/house_05may05.htm> (paĝo 7068), certe estas novaĵo. Ĉi-sube ni prezentas la rezolucion en plena formo, tio estas, en Esperanta kaj angla versioj kaj invitas vin viziti la retejon de Graham Steele - kun Esperanta informo-fenestro! - <http://www.grahamsteele.ca/gs_main_esperanto.html> kaj danki lin pro lia tre publika kaj aktiva subteno al Esperanto.

**Rezolucio n-ro 3690**

Konsidere ke la Esperanta lingvo estas simpla, fleksebla kaj belsona, kaj celas esti dua lingvo por ĉiu en la mondo; kaj

Konsidere ke la Esperanta-Rondo de Halifax-Dartmouth eldonas ĉiumonatan revuon, kiu nomiĝis "Inter Ni" kaj kiun oni enpoŝtigas trans la nacio kaj trans la mondo; kaj

Konsidere ke la apero de la maja numero 2005 (du mil kvin) rimarkindigas la komencon de la dudeka eldonojaro de "Inter Ni" per ties 229-a (ducent dudek naŭa) numero:

Pro tio ni rezoluciigu ke la Nov-Skotia Ĉambro de Deputitoj gratulas la redaktorojn kaj la verkistojn de la Nov-Skotia esperanta eldonaĵo, "Inter Ni", kaj deziras al ili daŭran sukceson.

ooooooooooooooooooooooooooooooooo

Whereas the Esperanto language is a simple, flexible and fine-sounding language, suitable to be a second language for the world; and

Whereas the Halifax-Dartmouth Esperanto Association publishes a monthly newsletter called "Inter Ni", which is read across the country and around the world; and

Whereas the May 2005 edition marks the 20th Anniversary of Inter Ni's publication and its 229th edition;

Therefore be it resolved that the Nova Scotia House of Assembly congratulate the editors and writers of the Nova Scotia Esperanto publication, Inter Ni, and wish them continued success.



## MEKARO en Toronto



partoprenantoj de MEKARO 2005

La **Mez-Kanada Esperanto-Renkontiĝo** ĉi-jare okazis en Toronto de sabato la 20a de majo ĝis lundo la 23a. Lundo estis feria tago - Viktoria Tago - en Kanado.

La renkontiĝejo estis en loko kiun la Torontaj esperantistoj uzas por festoj kaj troviĝas ĉe 77 Carlton Strato, nur kvin-minuta promeno piede orienten de metroa staci-domo College.

De la 1h30 ptm ĝis la 5h00 ptm sabate, iu (**Lunjo**!) daŭre deĵoris tie. Trinkaĵoj kaj manĝetoj estis senpage provizitaj de la Esperanto-Rondo de Toronto.

De la 3a ptm ĝis la 5a, **Ken** gvidis grupon por piede promeni en la cirkaŭa kvartalo. Okcidenten preter 'Maple Leaf Gardens', fame konata de hokeaj entuziasmuloj kiel la multjara ludejo de la Toronta hokea teamo La Acerfolioj. Trans strato Yonge, la plej longa ĉefstrato en la mondo, kiu dividas Toronton en orientan kaj okcidentan partojn.

Preter la konstruaĵo de la Sendependa Organizajo de Strangetuloj (angle: Independent Order of Oddfellows) - ne plu uzata de ili, kaj preter la ĉefpolicejo de Toronto, ĝis Universitata Avenuo. Tie ni direktis nin norden inter la Universitato de Toronto, okcidente, kaj la Parlamentejo de Ontario, dekstre, en Reĝina Parko.

Ni preteriris la Reĝan Ontarian Muzeon, nun pligrandigatan, kaj transiris straton Bloor, sub kiu estas la ĉefa orienta-okcidenta metroa linio. Norden ankoraŭ, preter Avenuo Yorkville, fama pro kafejoj/muziko/hipioj dum la sesdekaj jaroj, tiam orienten laŭ strato Cumberland kiu havas restoraciojn kaj butikojn ŝatatajn de vizitantaj filmstelulinoj kiam ili faras Holivudajn filmojn en Toronto. Ni reiris suden laŭ strato Yonge, survoje vizitante la Esperanto-kolekton en la ĉef-biblioteko de Toronto.

Inter la 5a kaj 7a ptm ni (krom Lunjo, kiu restis en la festĉambro por bonvenigi eventualajn alvenantojn) kune manĝis en la apuda Vjetnama restoracio 'Peach Garden'.



muzikumado dum MEKARO

Inter 8h00 ptm kaj proksimume 10h30 ptm okazis kultura vespero, kun muziko per piano, gitaro, fluto, kaj kantado. Aparte menciindaj estas (Torontano) **Curtis Ingalls** kiu ludis klasikan pianmuzikon; **Jeremy Bass**, kiu pianludis ĉiam kiam oni bezonis akompanmuzikon aŭ kantis; kaj la prezento de **Aarono Brown** kiu kantis, akompanante sin per gitaro. Aaron venis kun **Ŝeri Wells** kaj **Lorraine Bouchard** de la Detrojta regiono en Miŝigano. Se vi konas la kurson ***Pasporto al la Tuta Mondo***, vi jam vidis Aaronon,

ĉar li rolis en la lastaj lecionoj kiel kuzo de la ŝafisto, Ruselo. Li estas sprita talentoplena junulo! Post la muziko, okazis babilado kaj manĝetado ĝis ĉirkaŭ la 11a.

Dimanĉmatene ni kune matenmanĝis en la restoracio Daybreak je la angulo de la stratoj Carlton kaj Church, apud la renkontiĝejo, de la 10h30 ĝis la tagmezo.

Post la manĝo oni dividiĝis en grupoj laŭplaĉe por viziti elektitan lokon, kun loka Esperantista gvidanto. La elektoj estis:

1. Ekskurso al la Torontaj insuloj per pramŝipo. Tie oni povas pikniki, piediri, bicikli, kaj amuziĝi je la plaĝo (eĉ esti nuda en unu aparta sekcio de la plago, se oni dezirus). Tiel frue en la jaro, la akvo de lago Ontario estas tre malvarma. Ĉi-tage neniu kuraĝis naĝi.
2. Ekskurso al la zoologia ĝardeno de Toronto
3. Vizito al Casa Loma, mondfama kastelo en Toronto.

Se estus malbona vetero, tiu lasta estus pli bona elekto ol la du unuaj, kaj aliaj vizitindaj lokoj por pluva tago estus: la Ontaria Scienca Centro kaj la Arta Galerio de Ontario. Ni bonŝancis pri la vetero dum la tuta semajnfino, do, ne necesis konsideri tiun kriterion kiam oni elektis.

Dimanĉ-vespere diversaj grupoj manĝis diversloke, iuj en barata (hinda) restoracio. Unu grupo, post vizito al Casa Loma, promenis en Kensington Market antaŭ ol manĝi en ĉina restoracio sur strato Spadina, ĉe la norda rando de la urbocentra ĉina kvartalo.


**MEKAR-anoj vespermanĝas ĉine**

Ni rekunvenis en 77 Carlton St. je la 9a horo ptm por rigardi Esperantlingvajn DVD-filmojn de svisa reĝisoro Francisko Rondin, kiu estas oficiala filmisto de la svisa polico. Iuj filmoj havis esperantajn subtitolojn, dum alia havis dialogon en Esperanto.

Lunde matene **Jean Guy Richard** faris grupfoton de tiuj kiu venis por brunĉi kune denove en restoracio Daybreak, de la 10h30 ĝis tagmezo. Ankaŭ matenmanĝis kun ni afabla paro el SanFrancisko, "Koto" kaj "Trobo", kiuj ĝustatempe vizitis Toronton, kaj per la reto - ege utila ilo de la moderna vivo! - ekscius pri MEKARO. Post la manĝo kaj babilado, ĉiuj adiaŭis esperante renkontiĝi denove en estontaj jaroj.

— Ken Price


## Dekdua ARE en Novjorkio

Inter la 8a kaj la 10a de oktobro okazis la 12a Aŭtuna Renkontiĝo Esperantista (ARE) ĉe Silver Bay, Novjorkio, apudlaga konferencejo administrata de la junulara kristana asocio (YMCA). La aŭtuna renkontiĝo, la kreaĵo de kebekia aktivulo **Normando Fleury**, unuafo je ĉi-jare okazis en ĉi tiu loko: la unuajn 11 tiajn aranĝojn oni okazigis en Vermonto ĉi ski-feriejo Okemo, kies nomo


**partoprenantoj de ARE 2005**



fariĝis vaste konata. Pro diversaj kialoj, tamen, oni elektis novan lokon ĉi-jare, kaj, je diskuto renkontiĝfine, la 50-60 partoprenantoj sin prononcis ĝenerale favoraj al la nova renkontiĝejo. La partoprenantoj venis ĉefe de Nova Anglio, Novjorkio, kaj Kebekio. Iuj tamen vojaĝis longdistance por gusti la apartan etoson de ĉi tiuj renkontiĝoj: el Otavo, Pensilvanio kaj eĉ Meksikio. Plejparte ili alvenis la sabatan posttagmezon; la programo komenciĝis per baza kurso kaj samtempaj ludo kaj prelego. Tiun lastan, pri la Esperanta traduko de la Sagao de Njal, lerte donis **Francisko Lorrain** de Montrealo. Vespere okazis, kiel kutime en Esperantujo, interkona vespero; pere de interkona demandaro preparita de Normando, oni certigis ke oni ja renkontis siajn kunpartoprenantojn.


**kultura vespero dum ARE 2005**

La dimanĉan matenon oni daŭrigis la riĉan kulturan programon: **Steve Brewer** organizis kunverkadon de hajkoj, dum Jakobo Schwartz gvidis alian vortludon. **Zdravka Metz** poste gvidis literaturan horon, nova ero en la programo, en kiu diversaj personoj rekomendis plej diversajn librojn. Posttagmeze **Tomaso Alexander** prezentis interesan prelegon pri la 'Zamenhofa reformprojekto de 1894', kiu meritas propran artikolon. Profesoro **Ronald Glossop** ankaŭ priparolis 'la kulturon de Esperanto'. Paŭzo sekvis, dum kiu oni povis esplori la belajn ĉirkaŭaĵojn de la konferencejo - almenaŭ se oni pretis malsekiĝi, ĉar apenaŭ ĉesis pluvi dum la tuta semajnfino. Konkludis la tagon kultura vespero en kiu prezentiĝis kelkaj skeĉoj, kantoj.

En la lasta tago konkurencis kelkaj oratoroj, sed premiojn oni ne aljuĝis - ne pro manko de kompetento aŭ elokvento, sed ĉefe pro manko de juĝantoj! Normando Fleury finfine gvidis diskuton pri la venonta renkontiĝo, kaj granda plimulto voĉdonis por ke oni reokazigu la eventon en la sama loko en 2006. Malgraŭ la vetero, la renkontiĝo estis same sukcesa kiel kutime; abundis gejunuloj, kiuj flue parolis la lingvon; la konstruaĵo, kiun oni asignis al la kongreso, estis etosplena - ĝi eĉ enhavis grandan kamenon, en kiu konstante brulis fajro por varmigi la ĉambron - kaj povis dividiĝi al tri ĉambroj kiam okazis samtempaj aranĝoj. Gratulindas Normando Fleury kaj lia edzino, Zdravka Metz, kiuj ĉion organizis.


**N kaj Z, "kiuj ĉion organizis"**

— Geoffrey Greatrex

## Mallongaj Z-tagaj raportoj el…

### Calgary

Je sabato, la 17a de decembro, dudeko da esperantistoj kaj samideanoj kolektiĝis en la Kalgaria Esperanto-Centro por festi la ĵus pasintan naskiĝ-datrevenon de LLZ kaj baldaŭ venontan Kristnaskan datrevenon. La festo komencis per la kantado de Kristnaskaj kaj Z-tagaj


**Kalgarianoj festas Zamenhof-tage**

kantoj (en Esperanto) sub la gvidado de **Maria Hopkins** kaj piana akompanado de la ankoraŭ lertaj fingroj de **Janet Warren**. Post la kantado, ĉiuj prezentis sin laŭvice en Esperanto (laŭeble), kaj oni atakis la frandaĵojn kaj trinkaĵojn en akompano de du-, tri- kaj kvaropaj konversacioj. Fin-festene **Leena Atharia** regalis la bravulojn restintaj ĝis la fino per mallonga violon-koncerto. [psh]

**Toronto**

Zamenhofa Festo en Toronto: Inter 1 ptm kaj 11 ptm sabate, la 10an de decembro, esperantistoj kaj geamikoj renkontiĝis en la festoĉambro de 77 Carlton St., Toronto, por nia tradicia vintra festo, kiu ĉiam okazas proksime de la naskiĝtago de la aŭtoro de Esperanto (15 dec.).


Torontanoj festas Zamenhof-tage


Ni babilis, manĝis, trinkis, kaj iuj kantis kiam **Jeremio** aŭ **Jogo** ludis pianon. Ĉi foje oni ludis skrablon en Esperanto, ne nur per tegoletoj sur tabulo surtabla, sed ankaŭ kontraŭ la portebla komputilo kiun **Argilo** kunportis de Otavo, kiu en havas la skrablo-programon kiun li kreis. Se vi ŝatus provi vian lertecon kontraŭ tiu programo, vi povas fari tion per la interreto ĉe: http://www.skrablo.ikso.net

Depost sia pasinta vizito al Toronto, **Argilo** sukcese finis sian universitatan studadon, kaj nun laboras por softvara kompanio Entrust en Otavo. [kp]

**Victoria**

Okazis en Viktorio (BC) Zamenhofa Festo la 11-an de decembro 2006. Temis pri meztaga ĉefmanĝo tradicie kristnaska kun 'rostita maleagro' ktp. Festparolado de **Wally du Temple** pri d-ro Zamenhof kaj novaĵoj el Esperantujo sekvis. Fine, la gesamideanojn akompanis kaj gvidis gitarmuzikisto **Ralph Gonyea**, nia kluba presidanto. Bedaŭrinde, ĉiuj forgesis pri la okazo fari grupan foton. [wgdt]

## Peter Tan: Eterna komencanto de la Monda Lingvo


Peter Tan

[Peter Tan vizitas Kanadon ĉiun someron, kaj li estas membro de Kanada Esperanto-Asocio. Jen rakonto pri lia vivo; jam aperis en ***Familia Esperanto*** kaj ***La Torontano***, sed ni opinias ke ĝi interesos ankaŭ legantojn de *Lumo*.]

En 1939, Petro, dekses-jara studento, forvagis de sia hejmurbeto en suda Ĉinujo tra longa distanco al la urbo Gvaijang en la sudokcidenta provinco de Gvaizhou, esperante ke li trovos sian patron kiu laboras tie. Malfeliĉe, Petro ne trovis sian patron, kaj li devis vivi sola en fremda urbo ĉar lia hejmurbeto estis okupita de armeoj el Japanujo dum la japana invado de Ĉinujo ekde 1937.

Iutage Petro vidis publikan anoncon de nova klaso de Esperanto. « Monda lingvo? Kia lingvo ĝi estos? » li scivolis. « Ĉu Esperanto estas uzata en ĉiuj landoj en la mondo? » Li ĉeestis la unuan lecionon iuvespere kaj tuj interesiĝis pri la lernado de la monda lingvo. Bedaŭrinde la kurso devis esti ĉesigita, ĉar la juna instruisto el Koreujo foriris por milito partopreno kontraŭ la japanaj armeoj.



Post tri semajnoj de lernado de Esperanto, Petro jam povis legi simplajn legaĵojn en la monda lingvo. Li trovis Esperantan ĵurnalon en la urba biblioteko, kiun li povis legi per la helpo de Esperanto-ĉina vortaro. Al li plaĉis mallonga artikolo pri la temo de populareco. Li tion tradukis en la ĉinan kaj sendis al la redaktoro de ĉina ĉurnalo en la urbo. Post du tagoj Petro ĝojege legis sian tradukitan artikolon publikigitan en la ĵurnalo. Kiel ekscitita li estis, vidante sian nomon kiel aŭtoro, aperinta en la ĵurnalo.

Lia intereso pri Esperanto altiĝis, sed li ne trovis ŝancon por lernado de la monda lingvo la sekvantajn deksep jarojn, ĉar li devis vagi el urbo al urbo en kelkaj provincoj en Ĉinujo por vivtenado kiel juna vagulo.

En novembro 1955 bonŝanco alvenis al Petro kiam li ricevis neatenditan inviton de Luther-Kolegio en Usono, ke li envenu en la kolegion kiel fremda studento subtenata per bona stipendio. Li vojaĝis per ŝipo el Honkongo al SanFrancisko. La 5-an de decembro la ŝipo atingis Honolulu, Havajon, kaj la pasaĝeroj povis viziti Honolulu dum kelkaj horoj. Petro foriris el la ŝipo al la urbo promenante en la stratoj. Pasante la urban bibliotekon li vidis longan tolon sur la pordo en kiu estis la vortoj 'Esperanto-Ekspozicio'. Tuj kiam li envenis en la bibliotekon, li estis bonvenigita de afabla viro, kiu gvidis lin en la salonon, kie estis multaj Esperantaj libroj kaj gazetoj.

« Mi lernis Esperanton en Ĉinujo antaŭ multaj jaroj », Petro diris en simpla Esperanto la unuan fojon en sia vivo. Tio ĝojigis la afablan viron - inĝenieron. Eksciante, ke Petro estas turisto, li proponis konduki Petron en sia aŭto por viziti pejzaĝajn vidaĵojn. Li ankaŭ akompanis Petron viziti katolikan preĝejon, kie Petro estis prezentita al maljuna sacerdoto, gvidanto de la loka Esperanto-Asocio. Li donacis al Petro ekzempleron de la libro *Esperanto, Grammar & Comentary* kompilita de **George Cox**. La sacerdoto skribis sur blankan paĝon: « Al mia nova amiko, Petro, de havaja amiko, Frato **Charles Cummingsmith**, la 5-an de decembro, 1955 ». Je sia alveno en Luther-Kolegio en Iowa, Usono, Petro estis pli surprizata, ke Frato **Cummingsmith** jam sendis al li donacon de tridek usonaj dolaroj por aĉeto de libroj en la kolegio.

Dum la du jaroj (1956-57) kiam Petro loĝis en Usono, li ne havis ŝancon lerni Esperanton, sed en 1959, kiam li estis studento en Kanado, li ricevis ekzemplerojn de ***Dia Regno***, Esperanta gazeto publikigita de KELI (Kristana E-Ligo Internacia), kiuj lin multe interesis.

En decembro de 1959 Petro vojaĝis el Kanado al usona urbo Dallas en la sudo de ŝtato Teksaso per aŭtobuso. Alveninte li volis iomete ripozi en la atendejo de la stacidomo. Sed neatendite leviĝis problemo: li vidis du atendejojn, unu por blankaj homoj. « Kiun atendejon mi devas eniri? Mi estas nek blankulo, nek nigrulo » Petro sin demandis. Subite li memoris, ke en la membrolisto de KELI li trovis la nomon de profesoro en universitato en Dallas. Li telefonis al la profesoro kaj petis de li konsilon dirante: « Profesoro, mi estas ĉina turisto kaj komencanto de Esperanto, ĵus alveninta en Dallas. Kiun atendejon de la stacidomo mi devas eniri: ĉu tiun por blankuloj aŭ tiun por nigruloj? » Post momenta paŭzo la profesoro respondis: « Laŭ mia opinio vi povas eniri unu aŭ la alian laŭ via plaĉo. »

Kvindek jaroj pasis de kiam Petro komencis lerni Esperanton en 1939, sed ĝis 1990 li ankoraŭ ne havis ŝancon lerni pli progresigajn lecionojn de la monda lingvo. En 1990 la Universala Kongreso de Esperanto okazis en Kubo, kiam Petro estis loĝanta en Gvajano, malgranda lando en Sudameriko. Li volis vojaĝi al Kubo por ĉeesti la UK-on, sed li ne povis havigi vizon por eniri la landon tiujare.

Oni parolas la anglan lingvon en Gvajano, sed en ĝiaj najbaraj landoj oni parolas la hispanan lingvon en Venezuelo, la portugalan en Brazilo kaj la nederlandan en Surinamo. La deziron uzi la internacian lingvon en ĉiuj landoj devas esti sopiro de la gvajananoj, sed dum la multaj jaroj kiam Petro loĝis en Gvajano, li neniam renkontis iun, kiu scipovis Esperanton. Leviĝis do en lia kapo la penso « Mi estas nun tre maljuna. Por kio mi ankoraŭ interesiĝas lerni Esperanton? Ĉu Esperanto estas ankoraŭ utila por sepdek-jara oldulo? Mi ne havos ŝancon viziti fremdajn landojn kiam mi fariĝos malforta aŭ kiam mankas al mi mono. Al mi mankas ankaŭ la volo por skribi multajn leterojn al nekonataj amikoj per Esperanto pri diversaj temoj. » En 1992 Petro estis la sola UEA-membro loĝanta en Gvajano. « Por kio mi ankoraŭ pagas membro-kotizon en usonaj dolaroj al UEA? » li sin demandis kaj poste ĉesigis sian membrecon en UEA.

Sed li ĝuis legi kelkajn romanojn tradukitajn en Esperanton el diversaj lingvoj, kiaj ekzemple: *La unua amo* (el la rusa), *Fulmotondro* (el la ĉina), *La malica komizo* el la hispana), *La vojo de la serpento sur la roko* (el la sveda). Per Esperanto li povas ĝui la literaturon kaj kulturon de multaj landoj. Li legis en la revuo ***Esperanto*** de UEA (marto 1996), ke itala aŭtoro de romanoj Corrado Tavanti ** (1919 - 1995) lernis Esperanton kiel emerito kaj verkis tre bonajn verkojn. Subite fulmis en lia kapo la ideo: « Eĉ mi povus tion fari, se mi lernos pli bone la mondan lingvon. »

Kompreninte, ke la Esperanto-movado kreskas kaj grandiĝas nur kiam pli kaj pli multaj kredantoj, junaj kaj maljunaj, de la ideo de Zamenhof subtenas la Universalan Esperanto-Asocion, Petro decidis remembriĝi al UEA por la nova jaro 2003, kvankam li ankoraŭ neniam renkontis Esperantiston en Gvajano en la pasintaj dek sep jaroj (1986-2002). Li sentas nun, ke Esperanto jam grandigas lian mondon kaj varmigas lian koron per sia riĉa kaj bela literaturo. Eĉ loĝante sola en sia domo, Petro sentas varman amikecon de esperantistoj en multaj landoj.

La deksesjara komencanto de Esperanto en 1939 estas nun okdekjara oldulo, kiu estas ankoraŭ komencanto de la monda lingvo, kaj ne scipovas paroli Esperanton pro manko de kontaktoj kun esperantistoj, sed en lia koro Esperanto estos utila por li kaj la Monda Lingvo, Esperanto, vivos eterne.

el *Familia Esperanto*, 42 (2/2003)

## Kelkaj notoj pri la 6a Tutamerika Kongreso de Esperanto

[En majo de 2007 esperantistoj de la tuta Ameriko venos al Kalgario por la 7a Tutamerika Kongreso de Esperanto. Ĉi tie ni prezentas raporton pri la 6a TAKE, kiu okazis dum 2004 en Kubo; partoprenis ĝin pluraj kanadaj esperantistoj, inter ili la verkinto kaj kelkaj troveblaj bilde.]

Kiam mi frumatene atendis aŭtobuson por iri al la flughaveno en Toronto, la temperaturo estis -2°C (28°F), kaj la vento blovis malvarme. Post tri horoj kaj duono, fluginte trans la lago Ontario kaj nordorienta Usono, kiaj tiam suden kun la atlantika marbordo videbla tra la dekstraj fenestroj, mi estis en la Havana flughaveno. Trovo de la valizo okazis tre rapide - alvenis nur unu aviadilo dum la antaŭaj minutoj - kaj mi enviciĝis antaŭ la budo de unu el la enmigraj



oficiroj. De afiŝo sur kolono, mi eksciis ke mi uzis, laŭ ĝia ekzemplo, 'malĝustan ordon' por la ciferoj por la monato kaj tago en la loko por alven-dato, de la enir-formulo plenigita en la aviadilo. Kiam mi atingis la oficiron, mi komentis pri tio, preta preni novan formulon se necese, kaj reiri al la malantaŭo. « Ne gravas », li diris anglalingve, donis al mi kopion por konservi, kaj alian dokumenton por redoni kiam mi foriros el Kubo, kaj tralasis min.

La flughaveno havas sufiĉe grandan kaj bonaspektan halon - multe pli agrable trankvila ol la tro-okupataj flughavenoj en multaj alilandaj grandurboj. La kelkminuta veturo al la centra de la urbo estis sur bona preskaŭ malplena ŝoseo. Iom pli da prospero ŝanĝos tion. Ekonomia prospero ne estas ĉiumaniere bona!

En la urbo, kiam la taksio haltis, la ŝoforo ne sciis precize kie estas la Internacia Gazetara Centro (la kongresejo), sed diris « Ĝi estas ie tre proksime de ĉi tie. » Mi demandis al preterpasanta juna paro. « Ĉu temas pri Esperanto? » estis la respondo. « Jes, tie, en tiu konstruaĵo trans la strato. » Iomete surprizis min, ke ili sciis ne nur pri Esperanto, sed ke kongreso okazas en tiu konstruaĵo, ĉar estis neniu indiko, nek flago nek afiŝo, sur ĝia ekstero. Poste, en unu el la forumoj, unu el la Havananoj diris ke « ni havas problemon iom alian ol la aliaj amerikaj landoj. En Kubo ĉiu scias kio estas Esperanto. La unua paŝo kiun vi devas fari - eduki la publikon - jam estas farita ĉi tie. Nia tasko nun estas konvinki ilin lerni la lingvon. »


solena malfermo de TAKE 6

La ĉielo estis blua kun kelkaj blankaj nuboj, la suno brilis, kaj la temperaturo estis preskaŭ okdek gradoj. Surprize, mi ne sentis min tro varma. Supozeble la humideco ne estis alta. Tiel estis dum la tuta semajno.

Dum la malfermo ankoraŭ okazis, tri personoj deĵoris ĉe tablo en la enirejo, donante nomŝildojn, dokumentojn, informojn. Post ricevo de miaj dokumentoj, mi iris malsupren al la 'Salono Zamenhof' kaj ĝuis la finan prezenton de lerneja koruso en perfekte prononcita Esperanto.


gekanadananoj, de oriento kaj okcidento, kune prezentis en Kubo


Pri kio okazis dum la unua tago, mi citas el mesaĝo sendita de **Maritza Gutierrez**, prezidanto de la LKK kaj prezentanto en la Esperanto-elsendoj de Radio-Havano: Dimanĉe la 21an de marto estis solene malfermita la laborsesioj de la sesa tutamerika kongreso. La inaŭguran ceremonion ĉeestis la kuba vicministro pri kulturo kaj reprezentantoj de la kuba ministerio pri edukado kaj de la nacia biblioteko de Kubo. Aliĝis al la kongreso iom pli ol 170 kongresanoj el 20 landoj. (Fina aliĝnombro: 204)

Nome de UEA legis mesaĝon de ties prezidanto **Renato Corsetti**, sinjorino **Flory Wiwdoet**, prezidantino de Belga Federacio de Esperanto kaj vicprezidantino de Eŭropa Esperanto-Unio. La mesaĝon de la komisionestro de Ameriko, **Adonis Saliba**, legis sinjoro **Dick Piper** el Kanado, ankaŭ membro de la komisiono.

**Juan Ramon Rodriguez**, kuba membro de la amerika komisiono, prezentis skizan historion de

la tutamerikaj kongresoj ĝis tiu ĉi momento en Havano kaj poste, **Julian Hernandez**, estrarano de Kuba Esperanto-Asocio pri kulturo kaj disvastigo, kiu reĝisoras la kongresan temon, prezentis ĝin al la kongresanoj. Sekvis bonvenigaj paroloj de **Maritza Gutierrez**, KEA-prezidantino, kiu deklaris la kongreson oficiale malfermita.La solenaĵon fermis emsemblo de gitarludistoj de muzika lernejo de Havano kaj bela koruso de la sama lernejo.

Sekve estis prezentitaj tri ekspozicioj en la vestiblo de la kongresejo, (la internacia gazetara centro de Havano), sekvis prezento de bela telefonkarto kun la bildo de Zamenhof kaj la simbolo de la kongreso, kiun faris por la okazo la kuba telefonkompanio, okazis aŭkcio, kaj vespere, interkona vespero en klubejo de KEA en la urbocentro kie la esperantistoj ĝuis muzikon kaj dancis.



**Normand Fleury prelegas dum TAKE**

Du raportistoj el la Ĉina Radio Internacia raportas pri la sesa take, krom la havanaj elsendoj. Diversaj regionaj kaj tutlandaj radiostacioj, loka televidstacio, kaj ĵurnalo raportas pri la kongreso.

— Ken Price

## Pledo por pli da Esperanta klereco

Plurfoje oni demandis - kaj ankoraŭ nun sufiĉe ofte - min ĉu Esperanto havas estontecon el kultura vidpunkto. Tiu demando certe estas ŝokiga, sed kio plej ŝokas min estas la fakto, ke tiun demandon faras al mi homoj kiuj konsideras sin esperantistoj, aŭ en aliaj kazoj simpatiantoj kun nia lingvo kaj ties celoj. Estas vere kaj absolute nekompreneble, ke homoj kiuj iel ligiĝas al kultura movado, kia sendube estas la nia, povas dubi pri la kulturaj valoroj de lingvo kies ĉefa allogo - almenaŭ laŭ mia vidpunkto - estas tiu faceto.

Oni povas kontraŭargumenti, dirante ke lingvo estas antaŭ ĉio ilo por komunikado, sed je la fino, ĉu komunikado en si mem ne estas kulturo? Se ĝi estus - kaj ĝi ja estas - kulturo, kiun mi persone volas nomi kulturon de la parolo, tiam valoras la peno iomete esplori tiun terenon.

Mi opinias - kaj tiun opinion mi deziras esprimi sen ajna hezitemo -, ke tiu dubo pri la valoroj de nia kulturo naskiĝas en la kapo de homoj kies nescio de Esperanto igas ilin balbultantoj aŭ apogantoj kiuj daŭre vegetadas en la oceano de ignorado. Kiam oni diras pri iu ajn homo, ke li estas esperantisto, almenaŭ mi komprenas ke temas pri homo kapabla flue paroli la lingvon kaj posedanta la plej elementajn sciojn pri nia movado, la monda lingvo problemo kaj la solvo kiun Esperanto proponas. Sen tiaj minimumaj kondiĉoj oni povas esti simpatianto aŭ apoganto, sed neniel esperantisto.

Ĉar mi tuŝis tiun gravan aspekton de Esperanto, malgraŭ mia deziro ne eniri la terenon de polemikado, ne eblas al mi ĝin preteratenti. Dum pluraj jaroj - almenaŭ en Kubo - oni nomas esperantisto kiun ajn homon, kondiĉe ke la koncernato estu lernanta la lingvon aŭ iel helpu la evoluon de nia landa asocio. Tamen, por mi, esperantisto estas homo kiu engaĝiĝis en la batalo por pli bona monda komunikadordo, por solvado de la akre longedaŭra lingvoproblemo. Li estas iaspeca revoluciulo, kio kompreneble vicigas lin en neordinara socia tavolo.

Oni povas diri, ke ekzistas multaj simpatiantaj kun la ideo kiun la lingvo Esperanto reprezentas, ekzistas eĉ apogantoj kaj mecenatoj, sed esperantistoj ne estas tiom multaj, se konsideri ĉiujn



facetojn kiujn tiu vorto implicas.

Antaŭ ĉio, eblas aserti, ke homo estas esperantisto, kiam tiu homo povas flue paroli la lingvon kaj havas sufiĉan informnivelon pri la historio kaj la kuturo de Esperanto. Tio neniel signifas, ke mi malŝatas homojn apartenantajn al niaj vicoj, sed ankoraŭ ne posedantajn tiujn kvalifikojn. Ne! Mi eĉ opinias, ke ili estas kulturota grundo por plikreskigo de nia komunumo. Tamen, ili ne povas esti konsiderataj kiel veraj esperantistoj. Se havi tian starpunkton signifas ŝati kulturan elitismon, tiam mi senhezite - kaj eĉ sentime - deklaras, ke mi estas elitisto.

Ne malfacilas aserti, ke la kulturon de lingvo - estu kiu ajn lingvo - oni kreas pere de ĉiutaga uzado. Ekde la unuaj balbutaĵoj de niaj kavernaj praŭloj ĝis la lingvoj kiujn ni konas kaj uzas hodiaŭ pasis pluraj miloj da jaroj, sed estas evidente, ke nur danke al la senĉesa uzado lingvoj evoluis. Se hodiaŭ ni parolas pri la latina kiel mortinta lingvo, malgraŭ la gravega rolo kiun ĝi sendube ludis en la pasinteco, tio obeas ĉefe al la fakto, ke ĝi ne plu estas uzata, almenaŭ buŝe. La kultura heredaĵo de la latina lingvo estas delonge tradukita en plurajn naciajn lingvojn, kio permesas al kiu ajn homo legi la plej elstarajn verkojn de la t.n. klasikuloj en la nuntempe amase parolataj lingvoj de la plej diversaj popoloj. Same okazas kun la greka. Kaj se tiuj du lingvoj, kiuj siatempe estis la normalaj vehikloj por esprimado de homoj - uzataj de kleruloj kiel de simplaj popolanoj - mortis, ankaŭ tio povus okazi al nia lingvo, se nia anaro disvastigus la idealojn de Esperanto, ne flegante la uzadon de la lingvo mem. Per kripla uzado, aŭ kio estas ankoraŭ terure pli malbone, simpla neuzado, oni entute ne povas servi al la disvastigo de la lingvo.

Kiaj heroldoj povas esti homoj kies scio de Esperanto apenaŭ atingas la plej elementan komunik-nivelon? Ĉu ni iel povas fieri pri aparteno al lingva komunumo kiu ne kapablas trafe uzi la lingvon kaj faras nenion por alproprigi al si ties kulturon kaj historion?

La iniciatinto de Esperanto sufiĉe trafe difinis la signifon de la vorto *esperantisto* kiam li skribis: « esperantisto estas homo kiu parolas kaj uzas Esperanton por kiu ajn celo. »

Paroli kaj uzi. Jen la tiklaj vortoj. Ni ne bezonas bigotojn, nek iaspecajn fanatikulojn. Ni bezonas homojn kies posedo de la lingvo kaj la Esperanto-kulturo ebligus al ili saĝe argumentadi! Jam Kabe - per frazo kiun ĉiu esperantisto devas teni viva en la memoro - admonis nin: « Esperanton lernu unue esperantistoj. » Mi cetere preferas skribi anstataŭ lerni, ellerni. Ni ja devas ellerni Esperanton por kunkrei, pliriĉigi, plivigligi nian kulturon.

Ĉiu konversacio, ĉiu letero, ĉiu beletraĵo, ĉiu kanzono, ĉiu scienca disertacio en kiu ni uzas Esperanton estas netaksebla helpo al plisolidigo de nia lingvo. **Lanti**, la fondinto de Sennacieca Asocio Tutmonda diris: « Ni fosu nian sulkon. » Ek, do, al la laboro!

Eĉ se diletantismo iel utilis dum la unuaj tempoj de nia lingvo, nun ĝi estas danĝera, tre danĝera. Ami Esperanton signifas, almenaŭ tion mi firme kredas, antaŭ ĉio pretigi sin al bona regado de la lingvo, ties kulturo kaj historio. Nur tiel oni utile helpas al evoluigo de nia potencialo, nur tiel oni povas ĝin porti antaŭen, nur tiel la semoj donos fruktojn kaj respektigos la lingvon en kiu ajn medio, eĉ inter la skeptikuloj kiuj ne kredas nek fidas je ĝi.

Kulturo estas homa heredaĵo. Tio signifas, ke nur homoj povas ĝin flegi, evoluigi, riĉigi, vivigi. Estas nia devo kribri, trastudi la latentajn eblecojn de nia lingvo, por ke ni pluvoju kaj sukcesu

alfronti la defion de la estonteco.

Ni ne kredu kaj ne akceptu, ke diplomo atestanta pri kursofino rajtigas nin fieri pri nia esperantisteco. Ne, absolute ne! Ni pensu, ke ni kunkreas - aŭ almenaŭ strebas kunkrei - novan sociordon, novan komunikadordon, ke ni estas - kaj tion mi volas emfazi - batalantoj por pli digna, pli homa kulturo, ni estas reprezentantoj de senlima, senbara kulturo kiu defendas la plej grandan valoron de homo: ties homecon.

Ni konsciu, ke la venontaj generacioj dankos nin, ĉar ni ne nur montris al ili, sed ankaŭ pruvis, ke interhomaj kompreniĝo, paco, kulturo kaj komunikado eblas.

Ni pruvu per faktoj, per agoj pli ol per pensoj, ke la idealoj de d-ro Zamenhof pravis, ke lia genia lingvo vivas, ke ni povas, surbaze de nova kulturo, la kulturo de interkompreniĝo, atingi la efektiviĝon de lia revo, kiu ankaŭ estas la nia: « unu grandan rondon familian ».

— Juan Lazaro Besada

## Internacia komunikado per "Globalish"

[Kiaj la homoj estas stultaj! Eĉ kiam ili konstatas ke komunikado per naciaj lingvoj funkcias ne bone, multaj reinventas radon jam pruvita esti difektita anstataŭ efike atingi sian celon per lernado de Esperanto! Jen artikolo pri unu el tiuj provoj reinventi radon, nova speco de Basic English.]

En septembro mi aŭdis interesan intervjuon de iu, kiu havas novan ideon por plibonigi internacian komunikadon. Temas pri "Globalish", kaj ties kreiinto verkis libron por instrui ĝin.

"Globalish" estas ne nova lingvo, sed pli facila stilo de la angla lingvo. La kreinto de "Globalish" estas de Francio. La ideo venis al li kiam li partoprenis kurson por lerni la anglan. En la kurso estis lernantoj de diversaj landoj. Li rimarkis ke la lernantoj povis komuniki bone inter si per la angla, sed ili malpli facile povis komuniki kun anglalingvanoj, pro tio ke ĉi-lastaj ofte uzis nekonatajn vortojn kaj malsimplan gramatikon. Li do decidis verki libron por instrui al anglalingvanoj kiel uzi pli simplan kaj pli klaran stilon de la angla. Li faris liston de uzeblaj vortoj. Li ne ŝanĝis la anglan gramatikon, sed li instruas ke oni evitu la malfacilan gramatikon.

La kreinto de "Globalish" diris ke alilingvanoj studas la anglan. Pro tio, estas nur juste ke anglalingvanoj reciproke lernu ĉi tiun pli facilan stilon de la lingvo por plibonigi komunikadon.

Mi ne povas doni precizan opinion pri "Globalish", ĉar mi ne vidis la libron, sed ĝenerale, estas bona ideo klopodi uzi simplan, klaran stilon de iu ajn lingvo. Se ĉi tiu libro helpas atingi tiun celon, ĝi estas valora. Sed ĉu "Globalish" estas pli bona rimedo por internacia komunikado ol Esperanto? Eĉ ĉi tia simpla stilo de la angla estus multe malpli facile lernebla ol Esperanto. Ekzemple, en la angla la literumado estas iom neregula. Lernantoj devas memori, sur kiu silabo de vorto estas la akcento, kaj ankaŭ estas multaj neregulaj verboj – ĝenerale, estas la pli ofte uzataj verboj, kiuj estas neregulaj – en la angla. Krome, en la angla oni devas lerni pli da vortoj, ĉar oni konstruas malpli da vortoj el radikoj ol en Esperanto.

— Bruce Arthur

**Enigmo**: Kiu kanada esperantisto aperas plej ofte en la bildoj de ĉi tiu numero de *Lumo*? Sendu noton al la redaktoro (kien? vidu paĝon 23) dirante kiu estas ĉi-famulo, kaj en kiuj bildoj li aperas. La sendinto de la unue ricevota ĝusta respondo ricevos libropremion. Rapidu do!



## Recenzoj

*Ĉiu - Ĉiun: sep jardekojn en la Esperanto-movado*. Teo Jung. La Laguna/ Antverpeno: TK/Stafeto, 1979.


Teo Jung

**Teo Jung** estis la fondinto kaj mult-jara redaktoro de la gazeto Heroldo de Esperanto. Mi konis lian nomon, sed mi sciis malmulton pri li antaŭ ol mi legis ĉi tiun libron de li. Ĉi tiu estas dika sed tre interesa libro. Jung diris ke li ne deziras sekan denombradon de datoj kaj faktoj. Anstataŭ tio, li verkis libron kiu plenas je interesaj anekdotoj, ofte amuzaj. Sed li ankaŭ klarigis "ke tutmonda interlingvo estas afero nepre serioza, fakte unu el la plej gravaj kaj plej alstrebendaj celoj de la homaro", kaj li pene laboris tiucele.

Jung naskiĝis en Germanujo, en la komunumo Meckenheim, en 1892. Lia patro estis sendependa presisto, kaj dum pluraj jaroj la familio transloĝiĝis de loko al loko dum la patro klopodis gajni sufiĉe por vivteni sian familion. Kiam Jung estis dekdek-jarulo, li ĉesis frekventi la lernejon por povi helpi sian patron. Tamen, li ankoraŭ estis lernema, kaj li legis multe dum sia libera tempo. Estis tiam, kiam li lernis Esperanton. Kiam li estis deknaŭ-jaraĝa, li foriris por labori en alia presejo, kaj en sekvaj jaroj li laboris en diversaj presejoj en diversaj partoj de Germanujo. Li ankaŭ devis deĵori kiel soldato dum parto de la Unua Mondmilito.

Jung volis eldoni gazeton en Esperanto. Laŭ siaj kalkuloj, li povus sukcesi. En 1920, kiam Jung havis dudek sep jarojn, liaj gepatroj emeritiĝis, kaj li kaj la frato transprenis la presejon en Horrem, proksime al Kolonjo. Tie ili presis la unuan numeron de gazeto *Esperanto Triumfonta*. (Jung poste ŝanĝis la nomon al ***Heroldo de Esperanto***.) Komence, estis malmultaj abonantoj, sed abonoj iom post iom plimultiĝis, kaj post kelkaj jaroj la firmao fartis bone.Tiel ili povis aĉeti novan, modernan presilon. Poste Teo Jung komenci fari ***La Heroldon*** en Kolonjo, dum lia frato restis en Horrem, eldonante germanaĵojn. Teo Jung ankaŭ komencis eldoni librojn en Esperanto.

Post longa vico de amikinoj, en 1931 Jung edzinigis **Agneson**, kiu havis "kvazaŭ anĝelan vizaĝon". La libro ankaŭ informas pri la vojaĝoj de Jung tra Eŭropo, precipe por ĉeesti Universalajn Kongresojn.

En la 30aj jaroj, la firmao fartis malbone, parte pro tio ke **Adolf Hitler** kaj la Nazia Partio ekregis en la lando en 1933. Jung devis maldungi laboristojn. En 1935, la registaro malpermesis eldoni ***Heroldon***. Por povi plue eldoni la gazeton, Jung transloĝiĝis al Nederlando, kie li trovis hejmon/ kontoron en Scheveningen. Li devis vendi siajn presilon kaj aliajn maŝinojn en Germanujo kontraŭ malgranda prezo. En Nederlando Jung sukcesis ekredakti sian gazeton denove - ĝi presiĝis en Belgio - sed en 1940 Germanujo venkis Nederlandon, kaj ***Heroldo*** ĉesis aperi ĝis la liberiĝo ses jarojn pli poste. Intertempe, Jung dungiĝis en pag-oficejo.

Post la milito, Jung denove povis eldoni sian gazeton. Tiam li uzis presejon en Nederlando, kaj li ankoraŭ povis vivteni sin per ĉi tiu laboro.

En 1961, Jung petis kompenson de la registaro en Germanujmo, kaj li ricevis pli ol li antaŭvidis. Li ankaŭ ricevis pension. La sekvan jaron li transdonis ***Heroldon*** al nova redaktorino, **Ada Fighiera-Sikorska**.

Kiam Jung finis verki la libron, alvenis la jaro 1978, kaj li estis 86-jaraĝa. Li kaj lia edzino

Agnesa tiam loĝis kontente en sia propra hejmo en Scheveningen, Nederlando.

— Bruce Arthur

Eta perlo nord-amerika ***Nanatasis***. Robert Dutil. El la franca tradukis pluraj anoj de la Esperanto-Societo Kebekia. Montrealo: Esperanto-Societo Kebekia, 2005. 114p. 18cm. Koloraj ilustraĵoj. Prezo ĉe la Libroservo de KEA: 15$ (rabato por membroj de KEA:10%)




Aparte ĉarma libreto aperis en 2005 en Kanado danke al komuna traduko de kebekiaj esperantistoj gvidataj de **Zdravka Metz**: ***Nanatasis*** de la kebekia ministro **Robert Dutil**. Krom lingva reviziado de **Edmond Brent** ĝin valorigas, dividitaj tra inter la tekstoj, 20 ilustraĵoj de **Martine Saura**, sorĉe kolorantaj la naturaman, kontraŭ-militisman etoson. Sed ankaŭ la savhistorio mem, la kontakto inter la rakontanto, ĉasisto kiu esploras nekonatan terenon, kun indiĝena junulino, malmultvorta, inteligenta, mistere ligita kun la besta mondo - ĉio faras la konatiĝon kapta travivaĵo. Aldoniĝas vortoj ŝialingvaj: en la abenaka, kaptantaj la ĉapitrojn. Lastpaĝe ni legas tradukojn: Nanatasis signifas kolibron kaj transformiĝanton. Ŝia serena karaktero - simila al tiu similrola Kumeneŭaŭa ali-amerika - eĉ influas la skeptikan modernan mi-figuron: ne mortigi animalojn. Avide ŝi informiĝas pri la misa mondo, kies difektojn malkovras ŝiaj simplaj pensosekvoj: ĉu oni mortigas homojn?

Malgraŭ sia superregemo, la rakontanto ankaŭ sincere sentas ian respondecon: kiel ŝi - frukto-manĝanto - travivu vintre? Li proponas, ke ŝi venu kun li savi la homaron de la militemo, prefere ol gardi siajn sovaĝajn bestojn Ĝuste tiu malŝata esprimo distancigas ŝin. Li poste vidas nur kolibron. Ŝia plej kortuŝa reago postehas. Amiko, ĉu vi scias, kial la homoj freneziĝis? Kaj sian demandon pri ŝia travintra vivo nur post jaroj li povas imagi respondita laŭ rakonto de ebria ĉasisto: jes! Sed klarigi li povas ĝin nur ... nanatasise.

Lingvaj rimarkoj: la lingvaĵo estas altnivela, sed ne mankas francismoj, kaj (malmultaj) misoj. Ĝenerale estas konsilinde ke nesamlingvanoj kontrollegu tekston antaŭ la aperigo*. Dubinda vortuzo: *aliel*, *tiu* anstataŭ *jena* (p.43), *eliri la akvon* (el la akvo, p.58), *lingvo kaj aliaj materioj* (materialoj, p.60). Mirigas, ke post grava kanuakcidento nia rakontanto *stariĝis* (p.19) antaŭ ol *eksidi* kaj *pene ekstari* (p.20): ni komprenas *sin levis*. Alveninte ĉe la lageto min kaptis la krioj de Mkŭa (alvenintan). *Mi plene rekonscienciĝis* (rekonsciiĝis, p.101). *La tono de ŝia voĉo perfidis sian* (t.e. ŝian) *emocion* (p.96). Kaj *mi observes* (p.95) ne estas praesperantaĵo, sed preseraro.

*) Rekomendo de la subkomitato pri kulturo (2004)

— Robert Moerbeek (el *Esperanto*)

## Prezidanto de UEA alparolis la UN-Komisionon pri Homaj Rajtoj

Du reprezentantoj de UEA, prezidanto **Renato Corsetti** kaj mag. **Andy Kuenzli**, partoprenis la laborojn de la 61-a Sesio de la Komisiono pri Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo. La Sesio mem daŭras dum unu monato kaj alfrontas ĉiujn subtemojn ligitajn al la respekto de la homaj rajtoj en ĉiuj partoj de la mondo. La reprezentantoj de UEA partoprenis en la tagoj, en kiuj oni diskutis i.a. pri kulturaj rajtoj kaj edukado.



Partoprenante kunvenon kun la Speciala Raportisto pri la rajto je edukado, **M. Vernor Muñoz Villalobos**, la reprezentantoj de UEA ricevis la rajton alparoli la kunvenon. En siaj alparoloj Renato Corsetti, prezentinte Universalan Esperanto-Asocion kaj la apartan intereson de esperantistoj pri lingvaj homaj rajtoj, substrekis la neceson ke la fina rezolucio emfazu ankoraŭ pli la rajton je la edukado en la denaska lingvo de infanoj kaj la lingvajn homajn rajtojn ĝenerale. La interveno de Corsetti estis akceptita de la Speciala Raportisto, kiu mem citis sukcesajn kazojn de edukado en la gepatra lingvo kaj kiu promesis sekvi la temon dum sia mandato. Tuj poste ankaŭ la reprezentanto de Unesko, sinjoro **Singh**, de la fako pri lingva diverseco de Unesko, petis parol-rajton por klarigi, ke tio kongruas kun la nuna politiko de Unesko mem. Fine de la kunveno en interparolo kun la Speciala Raportisto de UN estis interŝanĝitaj promesoj pri estonta kunlaboro inter UEA kaj la Speciala Raportisto, juna kostarika diplomato, kiu intencas lanĉi tra la mondo serion de enketoj pri ĉi tiuj temoj kaj bonvenigas la kunlaboron de esperantistoj. La reprezentantoj de UEA profitis la okazon ankaŭ por altiri lian atenton al la skriba deklaro de UEA, kiu estis jam prezentita al ĉiuj landaj delegitaroj.



Renato Corsetti, Prezidanto de UEA

Estas malfacile diri, kiu estos la sekvo de tiu skriba deklaro. En kunveno pri la malneto de la rezolucio pri edukado, en kiu nur ŝtatoj rajtis paroli, la postan tagon la reprezentantoj de UEA rimarkis, ke la malpermeso de lingva diskriminacio en edukado estas klare formulita. Eble plia eĥo de la skriba deklaro de UEA estas la enmeto de la Programo por Evoluo de UN, pri kiu aparte parolis la deklaro de UEA, inter la Agentejoj de UN, kiuj devas partopreni la difinadon de la eduka politiko de UN/Unesko.

La reprezentantoj de UEA disdonis informan materialon al reprezentantoj de pluraj Ne-Registaraj Organizaĵoj. Ĝi estis disponigita ankaŭ sur la tabloj rezervitaj por la NRO-oj kaj ĉe kontaktoj kun landaj delegitaroj kaj kun alispecaj gravuloj, kiel **Marco Pannella**, eŭropa parlamentano, interesiĝanta pri Esperanto.

Fine estis okazo por interparoli ankaŭ kun **Renata Bloem**, la prezidantino de CONGO, t.e. la reprezenta organo de la NRO-oj, pri la estonta kunlaboro inter UEA kaj la reto de NRO-oj en Ĝenevo.

el *Gazetaraj Komunikoj de UEA* n-ro 204 (2005-04-02)

## *Vojaĝo en Esperanto-Lando* denove haveblas




La nuntempe plej furora Esperanta libro, *Vojaĝo en Esperanto-lando* de **Boris Kolker**, estas denove havebla, nun jam en tria eldono. Ĝia antaŭa eldono aperis en julio 2002 kaj la tuta eldonkvanto elĉerpiĝis en iom pli ol du jaroj. La unua eldono aperis en 1992 ĉe la Moskva eldonejo Progreso, sed en sia dua eldono ĉe UEA ĝi spertis ĝisfundan transformiĝon. Ĝi internaciiĝis enhave kaj ĝia grafika prezento fariĝis moderna kaj tre alloga. La plej nova eldono konservis la viglan dezajnon de **Francisco Veuthey** kaj fariĝis eĉ pli bela, ĉar ĝi aperis en pli granda formato, kun pli grandaj literoj kaj pli klaraj bildoj. Krome, troviĝas en ĝi kelkaj novaj ilustraĵoj.

La tekstaj ŝanĝoj estas minimumaj – nur du tekstoj, kiuj intertempe malnoviĝis, estas anstataŭigitaj – pro kio la dua kaj tria eldonoj estas uzeblaj samtempe en kursoj. Posedantoj de la nova eldono tamen profitos de multaj etaj modifoj (korektoj, aktualigoj, revortumoj kaj aldonaj informoj) en la komentaroj kaj apudtekstaj babiloj. Por la tria eldono Boris Kolker ankaŭ aldonis koncizajn informojn pri tipoj de planlingvoj, fundamenteco-oficialeco, Oficialaj Aldonoj, agad-direktoj de UEA, ktp. La teksto pri Interreto estas aktualigita kaj reverkita. Laŭ peto de multaj legantoj estas aldonita ankaŭ indekso de nomoj, kio ebligas facilan serĉon de informoj en tiu ĉi unika verko, kiu samtempe estas perfektiga kurso de Esperanto kaj vastpanorama gvidlibro pri la Esperanta kulturo.

Ligo al aktualaj informoj pri *Vojaĝo en Esperanto-lando* estas troveblaj en la retpaĝo <http://eo.wikipedia.org/wiki/Vojagxo>

el *Gazetaraj Komunikoj de UEA* n-ro 209 (2005-07-05)

## Vilna Deklaro

De la 23-a ĝis la 30-a de julio 2005 kunvenis la ĝis nun plej granda internacia renkonto okazinta en la litova ĉefurbo Vilno: la 90-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) kun pli ol 2300 homoj el 62 landoj. Ĉiuj laborkunsidoj, prelegoj kaj artaj aranĝoj disvolviĝis en la Internacia Lingvo Esperanto.

La Kongreso okazis cent jarojn post la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-ĉe-Maro (1905), kiu markis la eniron de Esperanto en la epokon de parola uzo. La Vilna Kongreso donis tial okazon pensi sub la titolo "Universalaj Kongresoj: 100 jaroj de interkultura komunikado" pri la tuta sinsekvo de Universalaj Kongresoj.

Tra jardekoj, kiujn karakterizis sociaj ŝanĝoj, politikaj perturboj kaj du teruraj militoj, la Kongresoj konservis sian plej elstaran trajton tiun de forumo por la renkonto de "homoj kun homoj" (kiel formulis **Lazaro Zamenhof**, la kreinto de Esperanto, en Bulonjo) kun firma volo superi la barojn de nacieco kaj ideologio. Pluraj sesioj de la Vilna UK estis dediĉitaj al la utilo, kiun la Kongresoj alportas al la partoprenantoj. Multaj emfazis la klerigan valoron de UK ne nur por vastigi sian scion en diversaj fakoj, sed ankaŭ por konsciigi pri la efikoj de interkultura komunikado je plej persona nivelo.

Zamenhof en sia parolado en 1905 celis krei senton de solidareco kaj la konvinkon, ke helpe de Esperanto eblas plibonigi la kunvivadon de homoj en la mondo. Sur tiu tradicio plue apogas sin la UK-oj, kiuj demonstras la daŭran aktualecon de la klopodo faciligi la homaran kunvivadon per la poioma laboro de individuoj kaj pruvas la gravecon de bona volo en la interproksimigo de homoj.

La Vilna UK, kiu okazis en la naskiĝregiono de Esperanto, je vojkruciĝo de kulturoj, denove montris, kiom sukcesa estas la unusemajna kunestado de homoj unuigitaj per la lingvo Esperanto kaj komune praktikantaj komunikadon sen antaŭjugoj kaj limigoj. La kongresanoj de Vilno firme fidas, ke la centjara historio de Universalaj Kongresoj kiel sukcesa ekzemplo de interkultura komunikado estos daŭrigata, kaj tial alvokas al homoj de simila bona volo lerni Esperanton kaj sperti similan travivaĵon, kiun ĵus donis la Kongreso de Vilno.

el *Gazetaraj Komunikoj de UEA* n-ro 210 (2005-08-03)



## Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2005

POEZIO: 1-a premio: Benoit Philippe (Germanio) pro la poemserio "Ekvadoro"; 2-a premio: Neide Barros Rego (Brazilo) pro "Rajdanto de l' revo"; 3-a premio: Sten Johansson (Svedio) pro "Vilna vilanelo". Partoprenis 31 verkoj de 16 aŭtoroj el 13 landoj.

PROZO: 1-a premio: Leif Nordenstorm (Svedio), pro "Signoj dum ŝtormo"; 2-a premio: Sten Johansson (Svedio), pro "Stranga hobio"; 3-a premio: Tim Westover (Usono) pro "Spektaklo". Partoprenis 34 verkoj de 18 aŭtoroj el 14 landoj.

ESEO: Premio Luigi Minnaja: Sten Johansson (Svedio) pro "Uzi interreton kiel tekstaron por lingvaj esploroj"; 2-a premio: Sten Johansson (Svedio) pro "Bohemia amoro"; 3-a premio: ne aljuĝita. Partoprenis 6 verkoj de 5 aŭtoroj el 5 landoj.

TEATRAĴO: 1-a kaj 2-a premioj: ne aljuĝitaj; 3-a premio: Marko Nikolić (Serbio kaj Montenegro) pro "Vuk kaj revolucio". Partoprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

KANTO: Premio An-Song-San pri Kanto: Enrika Arbib (Israelo) pro "Balado pri Hamleto"; 2-a premio: Roy McCoy (teksto, Nederlando) kaj Reese Scott (melodio, Usono) pro "Suna veno"; 3-a premio: Doron Modan (Israelo) pro "Eble" kaj Alejandro Cossavella (Argentino) pro "La Pordo". Partoprenis 11 verkoj de 9 aŭtoroj el 6 landoj.

INFANLIBRO DE LA JARO 2004: Esperanto-societo Liberiga Stelo (Kroatio) pro "Rakontoj sub la lito" de la familio Klobučar: verkita de la patrino Antoaneta, ilustrita de la 12-jara filino Ana kaj el la kroata tradukita de la patro Davor. Partoprenis 2 libroj de 2 eldonejoj el 2 landoj.

VIDBENDOJ: 1-a premio: ne aljuĝita; 2-a premio: Jill Gubbins (Britio) pro "La Duonokulvitro"; 3-a premio: ne aljuĝita. Partoprenis 3 konkursaĵoj el 3 landoj.

el *Gazetaraj Komunikoj de UEA* n-ro 210 (2005-08-03)

**Babilaĵo de l' redaktoro**



En la laste aperinta numero de *Lumo* (2003/2), Geoffrey Greatrex anoncis ke ĉi tiu revuo havos novan redaktoron… sed ial la elekto mistrafis kaj dum du jaroj *Lumo* ne aperis. Pasintan aŭtunon la estraro de KEA do elektis alian redaktoron, min, kiu iam redaktis deksep numerojn de *Alumeto*, kaj du numerojn de *Lumo* por KEA. La ekredaktado daŭris iom longe, sed vi finfine havas la duoblan numeron por 2005 en viaj manoj, kaj mi esperas ke la legado donos al vi tiom da plezuro, kiom donis al mi la redaktado.

La estraro kaj mi deziras ke du pliaj numeroj de *Lumo* aperu ĉi-jare, numeroj 2006/1 kaj 2006/2. Por tio ni bezonas publikigeblajn tekstojn: raportoj pri informa kaj socia agado de la kanada esperantistaro, artikoloj de kanadaj esperantistoj pri iliaj ideoj, recenzoj de kanadaj esperantistoj pri libroj legitaj, bildoj por ilustri tiujn raportojn, artikolojn, recenzoj ... kaj baldaŭ, ĉar mi jam ekredaktis numeron 2006/1.

Sendu kontribuaĵojn, mi petas, al **Paul Hopkins < hoppaul@gmail.com >**
**#55 - 9520 Bonaventure Drive SE, Calgary, AB T2J 0E5**

## La estonteco de eŭropaj lingvoj estas minacata, diras fakuloj

La 25-nacia Eŭropa Unio devas agi decide, se ĝi deziras garantii la estontan vivipovon de siaj 21 oficialaj lingvoj, laŭ internacia renkontiĝo de ekspertoj en Vilno, Litovio.

La averton oni publikigis la 22-an de aŭgusto 2005 nome de la pli ol sepdek partoprenintoj en la Kvara Nitobe-Simpozio, inter ili universitatanoj, politikistoj, registaraj funkciuloj, kaj lingvaj aktivuloj.

"Oni multe maltrankviliĝas pri la estonteco de la pli malgrandaj naciaj lingvoj, inkluzive la plimulton de la lingvoj de la novaj ŝtatoj-membroj de EU", diris d-ro **Humphrey Tonkin**, profesoro pri humanecaj studoj en la Universitato de Hartford, Usono, kaj unu el la kunvokintoj de la simpozio.

"Multaj decidoj estas nun farataj cele al fortigo de eŭropa unueco, sed sen konsidero de iliaj lingvaj implicoj", aldonis d-ro Tonkin.

Inter la partoprenantoj en la simpozio, kiu okazis en la litova parlamentejo de la 30a de julio ĝis la 1a de aŭgusto, estis parlamentanoj el Latvio, Litovio, Pollando, Slovakio kaj Slovenio. Ili ĉiuj konsentis, ke iliaj naciaj lingvoj riskas diversmaniere flankenŝoviĝi ene de EU.

"Estis pli ol 500 eraroj en la latva traduko de la Konstitucia Traktato", notis la latva ministro pri edukado kaj kulturo, d-rino **Ina Druviete**. "Kiel entute havi sencoplenan politikan debaton en tiaj kondiĉoj?"

D-ro **François Grin**, profesoro pri ekonomiko en la Universitato de Ĝenevo, liveris pritakson de la ekonomiaj avantaĝoj al Britio de la vasta uzo de la angla kontraste al pli larĝa lingvomikso en Eŭropa Unio.

"Eĉ laŭ plej sobra kalkulo, tiuj transpagoj al Britio sumas je pli ol 10 miliardoj da eŭroj jare", diris d-ro Grin. "Pli aktiva multlingva politiko kostus similan sumon sed distribuus la kostojn kaj avantaĝojn multe pli egale."

La Simpozio aŭdis ankaŭ pledantojn por pli granda rolo por la internacia planlingvo Esperanto ene de EU. "Ĝi estas la sola solvo samtempe justa kaj efika", pretendis d-ro **Sean O'Riain**, irlanda diplomato, kiu aktuale prezidas Eŭropan Esperanto-Union.

La konkluda dokumento de la Simpozio, redaktita de unu el la organizantoj de la Simpozio, d-ro **Mark Fettes**, profesoro pri edukado en Universitato Simon Fraser, Kanado, alvokas la ŝtatojn-membrojn de EU al kunlaboro pri evoluigo de komuna lingva kadro, kiu ekvilibrigu, unuflanke, protekton kaj pozitivan agnoskon de lingva diverseco, kaj, aliflanke, la bezonon de efika, altkvalita komunikado inter ĉiuj civitanoj de EU.

La Simpozion organizis Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvo-Problemoj, en kunlaboro kun la Universitato de Vilno kaj la Litova Akademio de Sciencoj, kun subteno de Esperantic Studies Foundation.

Pliaj informoj troviĝas en la retpaĝaro de la Simpozio:
<http://www.esperantic.org/nitobe2005.htm>

el *Gazetaraj Komunikoj de UEA* n-ro 214 (2005-09-11)